

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONPREZO: jare 1 Sm.; duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista. :- :- :-

La Balkanmilito.

Redakcio de I. S. R. ricevis kelkajn leterojn pro la artikoloj pri la Balkanmilito. El bohema vilaĝo venis poŝtkarto, petanta provekzempleron de I. S. R. Semajnon poste, venis granda letero, finiĝanta per: „Mi ne volas aboni vian teruran gazeton, ĉar mi ne volas legi tion naŭzigan, kion skribas diversaj skribistuloj, malsaĝuloj kaj aĉuloj. Vi estas por mi ankaŭ aĉulo kaj germana hundo.”

El Peterburgo grupo da studentoj skribis:

Est. redaktoro. Kun granda miro ni legas en lastaj n-roj de I. S. R. artikolojn pri balkana milito, kiuj pruvas plenan nescion kaj naiwan kredemon de la verkintoj al kelkaj gazetoj, kiuj dissemas malnoblajn kalumniojn pri slavo.

Unue, ni, kiel ĉiuj kiuj proksime konas slavan mondon, ne dubas, ke la nuna milito estas pli kontraŭtirana ribelo ol vera milito. Estas bone konata fakto, ke *registaroj* de tiuj landoj ne deziris tiun militon, nur popola voĉo kaj multjara ribelado en Turkaj vilajetoj tion devigis.

Jam dum antaŭa liberiga milito (1876—'78) germanaj, francaj kaj anglaj gazetoj dissemis sennombrajn kaj malnoblajn kalumniojn kontraŭ slavo kaj rusoj. Tio estis komprenebla, ĉar francaj kaj anglaj kapitalistoj timas liberan Balkanujon.

Se vi prenos en manojn iun ajn vojaĝraporton pri Balkanujo, vi povas konvinkiĝi, ke dum lastaj jarcentoj slavo kaj armenoj en Turkujo estis ekstermataj kaj rabataj de Turkoj.

Samo okazas dum nuna milito. Dum en okcidenta Eŭropo oni interesiĝas pri Balkana milito je vidpunkto de sorto de eŭropaj kapitaloj kaj koncesioj... ni rusoj kaj ĝenerale

slavoj — simpatias kaj admiras *noblajn* niajn fratojn, kiuj devis milite liberiĝi de kvincentjara jugo. Se vi aplaudas francajn revolucionojn de 1789 aŭ 1870, se vi admiras irlandanojn kiuj aspiras nacian sendependecon, se vi simpatias italojn kaj garibaldianojn antaŭ 1860 — kial vi ne povas kompreni ke slavoj ankaŭ deziras iomete pli libere spiri kaj sin savi el plej terura sanga turka subpremo. Ĉiuj krimoj al virinoj, infanoj . . . estas faritaj ĝuste de turkoj kaj nur infano povas kredi malnoblan kalumnion de turkoj (represetaj de kontraŭslavaj gazetoj).

Tial ni petas vin plibone ne presigi tute pribalkanajn artikolojn ol presigi evidentajn mensogojn.

Fine ni insistas presigi jenan deklaron:

Ni peterburgaj esperantistoj, bone konante nian slavan mondon, deklaras kaj certigas per nia honesta vorto, ke presitaj en la Socia Revuo informoj pri „sangavidaj krimoj de serboj kaj bulgaroj” estas malnobla kalumnio kaj mensogo.

Ĉu vi ne memoras aŭ ne scias ke antaŭ Balkanmilito — serboj kaj bulgaroj dum *50 jaroj* vane petegis Eŭropon, ke ĝi realigu promesitajn reformojn kaj aŭtonomion de Makedonio, Rumelio, Malnova Serbujo kaj Epiro? Se vi *tion* ne scias, vi ne rajtas skribi ion pri Balkanujo, ĉar ŝajnas vi tute ne konas la aferon.

Ni ankaŭ protestas kontraŭ esprimoj: sangavidaj *hundoj* k. t. p. per kiuj *vi kulturaj liberemaj homoj* insultas niajn karajn fratojn bulgarojn kaj serbojn, *kaj nin rusojn*.

Nia k-do en Sofio skribas longan leteron (el kiu kun ĝojo ni ekscias, ke li ne devis partopreni al la milito) en kiu li diras pri la karaktero de la sanga erupcio en la Balkanregiono:

„ . . . Unu el la aĉetantoj de Revuo estas sur batalkampo kiel volontulo. Vi certe miras, via cerbo ne povas eĉ ekpensi, ke persono, kiu sin nomas socialisto, povas esti partiano de la milito kaj iras batali kontraŭ la malamiko, sed mi devas diri, ke similaj personoj ne estas unuoj, ili estas multaj, eĉ la redaktoro de la social-anarĥista gazeto „Vekiĝo” en Bulgarujo, S-ro Girĝikov, organizis bandon de bravuloj kaj antaŭ la deklaro de la milito transpasis la limon kaj li kun siaj amikoj agis kontraŭ la turkaj soldatoj proksime je Ĉatalĝa. La kunlaboranto de I. S. R. Koŝmarov (pseŭdonimo) estas volontulo (li antaŭe, por eviti la militistan servon, dezertis al Rumenujo. Red.). Kiel povas okazi tio? La nuna milito estas rigardata ne kiel milito en la vera senco de la

vorto, ĝi pli prave estas daŭrigo de la centjara balkana revolucio kontraŭ la turka barbara regno.

. . . . Poste, kiam la tempo estos pli kvieta, mi revenos per artikolo al tiu milito. Ni ĉiuj estas principe kontraŭ la milito. Sed, kion oni komprenas sub la vorto milito? La franca k-do konsentas nur pri defenda milito? Sed kia estas la nuna milito? Ĝi estas eĉ pli ol defendanta. Post la paco ni vidos, kiuj loĝas sur tiu tero, kiun oni nomas Eŭropa Turklando. Ĉiuokaze laŭ nunaj statistikoj, ĉirkaŭ 1.500.000 estas bulgaroj, 1.000.000 grekoj, 150.000 serboj, 800.000 turkoj, aliaj estas albanoj. Ĉu la gajnintoj en striko ne devas striki por ke ankaŭ la restintoj gajnu? Ĉu ni principe estas kontraŭ la revolucio? Nu, kio estas milito, en kiu partoprenas pli ol 50.000 armigitaj civitanoj! Turkoj reformoj? Ridinda supozo eliranta de persono kiu ne konas turkan ŝtaton, kiu estas teokrata imperio. Sovaĝuloj, barbaroj, kruelajoj? K-do, vi certe eraris. Montru faktojn, okulatestantoj! Kiel malproksime ili estis de la batalkampo. Kadavroj k. t. p. — vi certe eraris pri la adreso En Bulgarujo estas 500.000 turkoj nun kaj ili estas lasitaj tiel liberaj kiel ili estis. . . .”

Antaŭ ĉio redakcio deziras deklari, ke por I. S. R. la etnologiaj esprimoj: slavoj, turkoj, romanoj, germanoj, ne havas ian signifon. Por ĝi ekzistas nur du rasoj: proletarioj kaj burĝaro. Samsortano, al kiu nacio ĝi apartenu, estas al ĝi centoble pli kara ol samnacia kontraŭulo. I. S. R. do jetas de si riproĉon, ke ĝi insultis nacion aŭ rason, aŭ ke ĝi havus eĉ plej palan ŝajnon de prefero por kiu ajn nacio.

Oni nun de ĉiuj flankoj prezentas la militon kiel ribelo kontraŭ tiraneco, kiel revolucio kontraŭ la turka subpremado. Oni deziras simple liberigi samnacionojn, ĝemantajn sub jugo de fremduloj. Nu, kion oni povos prezenti al la liberigitaj? Kion pli ol la duba feliĉo: esti de nun ekspluotataj, anstataŭ de fremdoj, de samnaciaj subpremantoj? Ĉu la liberigitaj post nelonge ne krios el profundo de l' koro: anstataŭ hundo venis hundo?

Ni memoras, ke la partioj socialistaj de ĉiuj de l' milito tuŝataj regionoj komune kaj unuanime, per klara manifesto, protestis kontraŭ la milito kaj montris la sekvojn por la balkanpopoloj. I. S. R. enpresis la tutan manifeston (vidu novembran numeron).

Por ni, socialistoj, la tuta milito, ribelo aŭ revolucio, estas burĝa afero, parte erupcio de naĉla kaj ŝovinista

deliro, parte entrepreno de havema kapitalismo por pligrandigi kaj liberigi al si sian kampon de ĉaso. Por la balkana laboristklaso ĝi povas havi neniun utilon. Tiun ribelon sekvas: ĉiufanka reakcio, ega plifortiĝo de militarismo, en Bulgarujo tuja kreado de militŝiparo, k.t.p., k.t.p., sen fino. Krom tio en la unua tempo estos konstanta danĝero, ke naskiĝas novaj disputoj kaj konfliktoj, unue inter la nunaj kunliguloj, kiel jam okazis dum la milito inter bulgaroj kaj grekoj.

La rusaj k-doĵ dubas, ĉu ni en okcidenta Eŭropo ion scias pri la „slava” mondo. Nu, ni volas demandi, kion ili scias pri ĝi? Ili „scias” tion, kion la rusa registaro deziras, ke ili sciu. Se oficiala Rusujo, anstataŭ Bosporus, dezirus ekkapti Belgradon aŭ Sofion, tiam niaj rusaj k-doĵ „scius” precize la malon de tio, kion ili nun opinias scii. La sciado de rusa popolo estas preparata en la oficejoj de la registaro, de la cenzuro k.t.p. Ili tial ne tro fidu en sia scio. La momenta simpatio de l’ rusa popolo kun la militantaj slavaj populaj estas dezirata de la rusa registaro. Ĉu oni vere kredas, ke la rusa registaro sincere simpatias kun aliaj popoloj, dejetantaj jugon? Kiu estas la plej terura subpremanto de longa serio da popoloj, slavaj same kiel aliaj? Parolu Finlando, Polujo, la Hebreoj en rusa imperio! La rusaj kamaradoj ne perdu tro da tempo pro indigno pri kruelaĵoj kaj subpremo de turkoj aŭ de kiu ajn raso. Ili povas lasi tion al sia burĝaro, por kiu, same kiel ĉie, indigno pro subpremado kaj kruelaĵoj estas artiklo, ekskluzive produktata por eksportado. Niaj k-doĵ povas sian provizon da indigno pli bone direkti al la katorgoj, la pogromoj, la nigrocentuloj — ol al la turkoj; jen kion ni scias! Kaj ankaŭ, ke la „Komatidĵoj” estas la plej amindaj, plej dolĉanimaj estaĵoj sur la tero! Ni plie rekomendas legadon de „Patrujo” kaj de „Inkvizicio” en nuna numero.

Estas en nuna tempo bona okazo por la laborista mondo montri al la regantoj, ke ĝi estas absolute *imuna* kontraŭ ĉiuj pretekstoj elpensataj por prezenti ian militon kiel necesa por kulturo aŭ neevitebla por akiri liberecon. Laboristaro nur havas unu malamikon — kapitalismo. Se tiu ideo penetras en la kapoj de l’ milionoj laborantoj, tiam milito same kiel kiu ajn subpremado baldaŭ ne estos plu ebla.

Kolonio Esperanta en Brazilujo.

Se ia propono estas farata, tiam oni spertas ke ankoraŭ ekzistas skeptikuloj, dubemuloj k.t.p. Je mia alvoko pri E. K.

mi ricevis dekduon da leteroj, kelkajn kun strangaj demandoj kaj supozoj.

Kiel nun estas kun tiu afero?

Nov. 1911 aperis en „Esperanto” artikolo pri fondo de tia kolonio. Ĉar mi klinas al terkultura laboro, mi tuj interkompreniĝis kun la iniciatinto, por esplori la aferon. Post longa korespondado maturiĝis la rezulto, ke mi fondos aŭ formos (propra propono de mi) pioniran trupon, kiu, gvidata de mi, transvojaĝos. La propono estus la sekvanta:

1. **Organizo.** La pionira trupo, kiu pretigos la intencatan E. K. estos kunvokata de Viktoro Strasser, ĉarpentisto. Ĝi konsistos el metiistoj diversaj el la konstrufako kaj terkulturistoj.

2. **Kunveno.** Tuj kiam s-ro Mayerhauser estos telegrafiinta al V. Strasser, ke la p. t. ekfunkciu, la pioniroj kolektiĝos kiel eble plej rapide en iu haveno.

3. **Forveturo.** Kiam la pioniroj estos kolektiĝintaj en ankoraŭ difinita haveno, tiam oni kune per la proksima vaporŝipo vojaĝos transen.

4. **Ordo dum veturado kaj sekvanta tempo.** Kiam oni estos enŝipiĝinta, la pioniroj elektos komitaton, kiu ordigos la nutradon, vestadon kaj ceteraj aferoj de l’ p. t. La komitato konsistos el dek viroj. La tuta trupo eble el cent membroj.

5. **Alveno.** La p. t. estos gvidata de s-ro Mayerhauser al la difinita loko.

6. **Dispartigo de l’ laboro.** Antaŭ aĉeto de semajoj oni forhakos la praarbaron, por ke ĝi sekiĝu. Dum tiu tempo, daŭranta eble 3—4 semajnojn, oni komencos la konstruadon de la diversaj ejoj bezonataj de l’ p. t. Dum forhakado oni loĝos en tendaro. Kiam la faliĝinta arbaro estos seka, ĝi estos forbruligata, escepte la arboj, kiujn oni bezonas. Post tiu laboro kolektiĝos la terkulturistoj unuflanke kaj la metiistoj aliflanke. La terkulturisto plantos la fruktojn. La metiistoj konstruos la vilaĝon, laŭ plano de Strasser.

Pri aliaj aranĝoj konsiliĝu la tuta grupo.

Tiel estis la afero 18an de Novembro 1912. Tiam venis jena karto:

Ankoraŭ ĉiam mi ne estas sukcesinta vendi mian negocjon, tial mi nenion plu povis fari en nia afero. Sed mi aliĝis nun al la afero, pri kiu mi sendas al vi samtempe prospekton. Tio estas io jam ekzistanta, kaj tre similas al

mia antaŭa projekto. Kiam venos la tempo, mi nature tuj sciigos vin, ĉar ankaŭ en tiu nova afero, pri kiu la eltrovinto nomis min sian delegiton por Germanujo, vi verŝajne trovos tre favorajn vivkondiĉojn kaj agrablan okupadon. Tial mi forlasis mian projekton tute, ĉar kiam mi kalkulis komerciste, mi ekvidis tro grandajn malfacilaĵojn rilate al la mona flanko de la entrepreno. Pliajn sciigojn mi povos doni al vi ĉirkaŭ meze de Decembro, ĝis kiam mi ricevos ĉiujn detalajn informojn el Brazilio. Intertempe bonvolu sufiĉi je la enhavo de la samtempa presajo. Ĉu vi eble ne prokrastos intertempe vian programon en I S. R., ĝis kiam ni havos ĉiujn bezonatajn detalojn?? Sed ĝenerale ne lasu vin ĝeni de skeptikuloj, ili mokis ankaŭ min!

Ŝajnas al mi, ke ni preskaŭ tute ne bezonos ŝanĝi nian programon en la nova entrepreno. Ĉu mi ne faris pli bone, aliĝi, pro unueco, al io jam ekzistanta, ol kiel tute malgranda societo eble fari brilan malsukceson??

J. MAYERHAUSER.

Kaj nun, kion fari? Eble, miaj samcelanoj sin sentas trompataj. Sed mi diras, ke neniu estas trompata, kiu la aferon de komence ĝuste komprenis: fondi komune kolonion, en kiu ĉiu havas samajn devojn kaj rajtojn kaj en kiu ĉio estos farataj por la bono de la membroj.

Denove mi diras: Kiu la aferon ne bone komprenas, tiu pli bone restas hejme.

La demando nun estas tiu ĉi, ĉu ni mem fondos kolonion, aŭ ĉu ni atendos la rezulton de s-ro Mayerhauser. En la sekvantaj numeroj mi komunikos detalajn kondiĉojn de la vivo kaj elmigrado, eĉ pri la donajoj de l' Brazilia registaro. Intertempe mi postulos diskutadon de samcelanoj kaj partoprenantoj.

V. STRASSER,

Villa Drei Thorspitz, en Garmisch, Bavario, Germanio.

Ĉar mi supozas ke la Leipziga k-do A. M. kaj eble ankaŭ aliaj k-dojoj estas malmulte aŭ maljuste informitaj pri tiu afero, mi volas mallonga priskribi informojn donitajn al mi kaj esprimi mian opinion.

Jam la unua aludo „burĝa entrepreno” ŝajnas al mi ne esti prava, ĉar mi en la tuta programo nenion rimarkis kio ĝin pravigus. La demokrata konstitucio, kiu garantias senklasan egalecon, egalrajtecon de ĉiuj, eĉ virinoj, kiu ne toleros mallaboremulojn k.t.p., tute malebligas ĉiun burĝan evolucion. Sed krom tio, la ĉefa rimedo por kia ajn

individua kapitalista entrepreno, „la mono”, tute mankas. La iniciatinto mem ne havas nomindan havaĵon kaj li volas efektiviĝi la ideon nur per tiuj rimedoj, kiuj donadas brazilan registaro. Ili estas jenaj:

Ĉiu elmigronto, kiu antaŭ reprezentanto de brazilia registaro deklaras sian intencon, enmigri Brazilujon kaj tie ekloĝiĝi, ricevos senpagan transveturadon por si mem, por sia familio kaj siaj pakajoj, ĝis al la elektita loko. Sekve neniu pagos marveturadon el sia propra poŝo, sed nur la mallongan vojaĝon al la plej proksima haveno (eble ĉiuj al unu, ekz. Hamburg). Transe, oni je la komenco ankaŭ ne bezonos monon, ĉar la tiea registaro donadas terposedaĵon je kredito tre malmultekoste. Oni ankaŭ ricevos semojn, ilarojn kaj k.t.p., eĉ dum duono da jaro (antaŭ ol oni havos propran rikolton) manĝaĵojn senpage.

Kompreneble, oni devas en komenco diligente kaj multe labori, ĉar la tero ne estas ankoraŭ preparita por tuj semi aŭ planti kreskajojn, sed poste oni havos abundan rikolton. Memkompreneble estas pli bone, se oni kunalportas iom da mono, sed nepre necesa ĝi ne estas. Tiamaniere estos ebla, se oni estos multnombra societo, iom post iom komenci ankaŭ industrian laboron. Vere estas rekomendinde esti singardema ĉe tiaj gravaj decidoj, sed la Leipziga k-do A. M. esprimas neeblecon postulante garantiojn de senatoro (aŭ senato), kiu ankoraŭ ne ekzistas. Aŭ, kiun senatoron li opiniis? Tiajn garantiojn oni eble povus postuli, se oni estus dungito de iu kapitalista entrepreno, sed ni kiel liberaj homoj, kiuj propravoje volas forlasi patrujon, por ke ni povu en fremdlando fondi pli bonan, ne povas ion postuli de kamaradoj, kiuj faris nur la saman.

Al tiuj, kiuj ne havas firman decidon pacience elporti kelkajn malagrablojn de alkiutimiĝo en pli varma klimato kaj precipe al tiuj, kiuj tiel forte amas sian duonpatrinan patrujon, ke ili eble malsaniĝus pro sopirego al ĝi, al tiuj mi frate konsilas: restu prefere hejme, vi ŝparos al vi multan malĝojon, kaj al viaj kunuloj malagrablojn. La sekvanta ideo de k-do A. M. pri cindrigo de mortintoj estas vere tre bela, sed en tia situacio, en kia ni estos troviĝantaj, ne aktuala, ĉar ni havos pli urĝajn demandojn por solvi.

Al la lasta deziro de k-do A. M. mi povas nur ripeti: Se la iniciatinto kaj liaj kunuloj havus tiom multe da mono por komenci la laboron kaj sufiĉi al ĉiuj postuloj, tiam ni estus liaj dungitoj, liaj sklavo.

Sed ni volas havi propran patrujon, liberan esperantujon kaj pro tio estos pli bone, se ĝi estos konstruata sen helpo de individua kapitalo.

FRATECANO.

Red. petas, sendi kor. pri tiu ĉi temo al k-do Strasser.

Parolo de Normando.

Mi vidis riĉan domegon, kiu havas ja cent fenestrojn. En ĉiu ĉambro estas lito kaj granda kameno. Ĉevalo irus facile ĝis la supra parto, tiom larĝa estas la ŝtuparo. Ĉirkaŭ la domo, estas granda parko ku herbejoj kaj aretoj da arboj kaj floroj; ĉio tio estas ĉirkaŭata de granda muro kaj gardata de pordisto, kiu samtempe estas ĝardenisto.

En tiu domo oni trovas lokon sufiĉan por loĝi kvindek familiojn. Kelkaj centoj da infanoj povus kuri en tiu parko; aŭ, se oni kulturus tiun tutan bienon, ĝi donus grenon, terpomojn, fruktojn. Nune ĝi utilas neniel.

La posedantojn de tiu bieno oni neniam vidas. Certe ili estas en Parizo aŭ en Nice dum vintro; en la montoj aŭ sur la marbordo dum somero; ili iras el hotelo en hotelon, kaj enuas ĉie. Estas tamen feliĉo ŝatinda, neniam esti sen mono; sed ili kutimis je tio; ili ĝin ne plu sentas. Kontraŭe, ĉar ili estas nenion farontaj, ili atentis pri sian sanon, pensas esti malsanaj kaj sin ellasas al la kuracistoj; tial ilia gut-kalkulilo sekvas ilin ĉien. Por forgesi ĉiujn tiujn mizerajn, ili havas „brigon”. 1) Pri tiu luksa loĝejo, ili pensas neniam.

Tiel, jen riĉaĵo fortika kaj pozitiva, komponata el objektoj utilaj, kaj ĝi tamen estas utila por neniu. Ĝiaj posedantoj ricevas de ĝi nenion eron da feliĉo. Iru nun promenadi en Saint-Hilaire 2), kaj vidu en kiu malpura strat-kanalo la infanoj ludadas!

Ĝardeno sen infanoj kaj infanoj sen ĝardeno, jen du aferoj malgaje vidotaj, sed klarigataj unu de la alia.

ALAIN. 3)

1) Brita kartludo.

2) Laborista kvartalo en Rouen, franca urbo.

3) Ĉiutage en „La Dépêche de Rouen”, gazeto franca, aperanta en Rouen (Seine-Inférieure) Alain, unu el la plej liberaj spiritoj nunaj, eldonas sian „Parolon” pri ĉiaj temoj. („Alain” estas falsa nomo de profesoro de filozofio en la Universitato).

La Patrujo.

Amu vian patrujon, civitanoj; sed vi ne faru el ĝi eksklusivan celon de via volo, de via sento, nek de via penso. Estas alia patrujo, pli granda: ia tero.

El la tero vivadas ĉiuj homoj, ne el la sola nacio al kiu vi apartenas. Kiel mizere kaj maloportune ni vivadus, sen la produktoj el la restanta Eŭropo, sen tiuj el Afriko, el Ameriko kaj el Azio!

La ideo pri la aparta patrujo estas sub multaj vidpunktoj malbonega. Ĝi ekscitas kaj subtenas envion kaj malpacojn inter la nacioj, provokes konfliktojn, ekbruligas militojn; ĝi devigas la subtenon de grandaj militistaroj kaj armeoj, kaj la fortifikadon de la landlimoj; ĝi kreis la doganojn kaj malebligas la liberan interŝanĝon de produktoj.

Nur la limigo de landoj apudaj, kiom da luktoj ĝi naskis! Kaj dum la nacioj estas ĉiuj pretaj kontraŭbatali sin pro celo da tero kiun oni uzurpis al ili, aŭ pri kiu ili pensas ke oni uzurpis, ili rigardas indiferece kiel siaj landanoj elmigras.

Se la ideo de aparta patrujo almenaŭ igus respektata tiun de la aliaj popoloj! Sed, en nomo kaj pro intereso de la aparta patrujo, oni konkeras la patrujon de aliaj, kaj oni prenas koloniojn, insulojn kaj eĉ marbordojn de malproksimaj kontinentoj. Tie estas mia patrujo kie estas mia standardo, diras nun la nacioj.

Kiom da sovaĝaj sentoj vekas la ideo de malgranda patrujo!

Ne ekzistas krueleco nek barbareco, kiun la patriotismo ne naskis kaj legitimis. La patrujo estas la altaro sur kiu plej da viktimoj oni oferas. Puraĵ estas la oferoj kiujn en ĝi oni faras; nenion valoras kaj nenion signifas tiuj, kiujn oni faris al dio Molok kaj al la aztekaj dioj.

Ni do laboru kaj senĉese sopiru por la granda patrujo. Nur kiam ni ĝin havos en la tuta tero, tiam ĉesos verŝi sangon la altaro de tiu moderna Molok, kaj oni vidos en la homoj nur membrojn de unu sola familio.

Julio 1912.

Hispana verkisto F. PI MARGALL.

Tradukis JULIAN SOLANILLA ELFAU, Tarassa (Hispanujo), Strato S. Jose 72.



La inkvizicio en XXa jarcento.

Partoj el leteroj ricevataj en redakcio de „Politika Malliberulo“.

Algaĉe. 1) — „... Laŭ ordono de gubernestro Kiaŝko: 1. Al 10 personoj oni enjektadis arsenikon; 2 al ĉiuj malsanuloj oni malpermesis aĉetadi lakton kaj bulkojn, kontraŭ ordono de kuracisto; 3. oni katenigas ĉiujn malliberulojn en manoj kaj piedaj katenoj, eĉ tuberkulozajn malsanulojn, kiuj ĝis nune estis liberaj de portado de katenoj; 4. oni malpermesis aĉetadi konsumproduktojn por propra mono; 5 oni malpermesis skribadi kaj ricevadi leterojn; 6. legado de libroj estas malpermesita; 7. la skribajn materialojn oni konfiskis; 8. politikajn malliberulojn oni lokigis inter la krimuloj; 9. kelkajn malliberulojn oni sendis al aliaj malliberejoj; 10. de tuberkulozaj malsanuloj oni forprenis la varmajn vestojn kaj tolaĵojn.“

„Ni niaflanke decidis meti nur pasivan opozicion. Ni respondas plej ofte per silento, sed ni neniam rifuzas klarigojn pri motivoj de nia silento. Sur eventualaj korpaj punoj nia respondos same kiel Kutomara...“

El dua letero el Algaĉe:

„... Treege malagrabla estas ekpensi ke liberaj homoj ne subtenas nin. Morale ni estas fortaj, kaj ni ne ĉesas batali... Sed kiel? ...“

Eble nur per memmortigo...“

Nune el telegramoj mi jam scias ke memmortigoj en Algaĉe okazis!

Kamaradoj!!! Ĉu post la katastrofoj en Kutomara kaj Algaĉe ni povas esti silentaj? Ne, kaj ankoraŭ unufoje ne. Ni ne povas silente vidi kaj aŭdi kiel niaj plej bonaj, plej revoluciemaj kaj plej malfeliĉaj kamaradoj devas per memmortigo protestadi kontraŭ neaŭdeblaj krimoj ĉiutage sur ili plenumataj per sanga cara registaro. Ni devas organizi protestkunvenojn en ĉiuj urboj de la tuta mondo, ni devas disvastigadi sciigojn pri tiuj teruraĵoj kiel eble en plej vastaj rondoj de homaro. La homoj sciu ke en la 20a jarcento en Eŭropo ekzistas barbara registaro, kiu kvazaŭ liberigas la Balkanajn slavojn kaj samtempe sovaĝe turmentas kaj mortigas ne nur sendefendajn sed eĉ malsanajn kamaradojn! Ni organizu ĉie protestkunvenojn kaj sendu pri ili sciigon; se

1) Algaĉe estas unu el Katorgaj malliberejoj en regiono Nerĉinsk. La originalojn de leteroj la redakcio de „Politika Malliberulo“ donis al arkivo de Akademio de Scio en Krakovo, kie oni povas ilin vidi.

ne eble organizi kunvenojn, sendu protestleterojn kun legeblaj subskriboj al k-do Severino Przybyszewski, Bakovicka str. 4, 3a etaĝo, Krakovo, Aŭstrio, Galicio.

Ankaŭ tie mendu broŝuron „Politika Malliberulo“, (vidu I. S. R. de Okt. 1912, paĝ. 115); unu ekzemplero kostas 25 spesdekojn. Oni akceptas ankaŭ ĉiulandajn poŝtmarkojn.

La 7an Okt. en Varsovio, rusa parto de Polujo, okazis striko, kiel protesto kontraŭ torturoj al politikaj malliberuloj generale, kaj speciale kontraŭ tragediaj okazoj en Kutomara malliberejo. Strikis laŭ oficialaj informoj 10.000 laboristoj.

JANKO.

Ĝardenurbo-revado.

Kamaradoj, ĉu vi ne ofte revas pri la estonteco, kiam tra la mondo oni trovos ĝardenajn urbojn — urbojn en kiuj vivos feliĉaj laborantoj, ne en domaĉoj amasigitaj, ne en mallumaj, malodoraj slumoj, en kiuj la sunbrilo preskaŭ ne povas eniri, sed en urboj elplanitaj kun vastaj stratoj, domoj bele lokitaj kun iliaj propraj ĝardenoj kun fruktarboj kaj legumoj — urbojn, kie estas sanaj infanoj ludantaj en parketoj, inter la stratoj — urbojn, kie la fabrikejoj estas sub la plej bonaj kondiĉoj, kie la laborantoj neniam laboras pli ol ok horojn ĉiutage, kaj ricevas la tutan profiton de sia laboro — urbojn kie la lernejoj estas preskaŭ palacoj, kun belaj pentraĵoj, kun bonegaj ludplacoj, en kiuj oni trovas ĝardeneton por ĉiu lernanto?

Kamaradoj, tiuj ĉi idealoj devas esti realigitaj jam sub kapitalismo, oni komencis parte konstrui tiajn urbojn en Anglujo, Francujo kaj Germanujo, sed bedaŭreble oni trovas muŝon en la mielujo, ĉar kvankam ekzistas progresemluloj kiuj celas tiajn kondiĉojn, ĉiam alvenas sub kapitalismo — personoj kiuj deziras amasi monon, kiuj serĉas malkarajn gelaborantojn, kiuj kontraŭlaboras socialismon.

Tamen, ni ne devas esti malkuraĝaj. Ĉar alvenos socialismo, alvenas la horo kiam la laborantoj mem posedos fabrikejojn, kiam ĉiu laboranto ricevos la profiton de sia laboro. Ĉiu socialisto devas havi la idealon: Antaŭen! kaj tiam revoj fariĝos realaĵoj.

F. A. G.

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

Efektive, mi ne scias ĉu mi kuraĝas skribi sub ĉi tiu rubriko, ĉar multo okazas nuntempe en nia lando, kaj lastfoje nia redaktoro mallongigis kelkajn kaj ne presigis aliajn el miaj raportetoj. Ĉu la ĵurnalo estas tro malgranda, ĉu la artikoloj estas tro grandaj, ĉu mi ne sufiĉe bone skribas esperante, aŭ ĉu la kara redaktoro opinias ke Hoyle estas tre tolerema kaj indulgema homo, kaj ne zorgos ĉu li skribos vane aŭ ne? La kialon mi ne scias, sed mi preferas pensi la lastan.

La feministoj (kiel mi raportis antaŭ du monatoj, nepresita) nun post la skismo, batalas en du apartaj sekcioj, la militemaj kaj la pasivaj. Pri la lastaj mi scias nenion rakontindan, sed la novaj taktikoj de la militemaj gefeministoj eble interesas niajn kunlegantojn.

En la malliberejo troviĝas grandaj aroj da virinoj kaj nemultaj viroj ili rompadis ĉie tra la lando la fenestretojn de la fajralarmiloj, per ĉi tiu oni elvokis la fajrbrigadojn en tre multaj urboj, en Londono sole la kosto dum unu semajno estis pli ol 1000 Sm., oni sukcese elvokis unu brigadon, vaporŝpruĉilojn kaj ŝtuparosavilojn, ĉio aperis ĉe la supozataj bruloj, trifoje dum unu vespero. Alia petolaĵo estas la enverŝado de bruligantaj acidoj en la poŝkestoj, ĉie en la lando samtempe. Ankaŭ koloraĵo, inko, sukero, gluajo estis enmetata inter la leteroj el la postujoj. La feministoj malliberigitaj ankoraŭ daŭrigos la strikon kontraŭ nutrado, kaj oni raportas en la ĵurnaloj, ke la doktoroj devige estas nutrantaj ilin. La kuraĝon de ĉi tiaj personoj ĉiuj admiras, sed multaj eĉ parlamentistoj dubas, ĉu la balotrajto meritas tiel severan sindonon, neniu ruĝulo povas logike subteni la aferon, ĉar la postulantinoj estas ofte la filinoj kaj fratinoj de la aristokratoj, la plej multaj estas burĝklasanoj, doktorinoj k.t.p. k.t.p., kaj la programo de ĉia socialista politika partio surhavas la postulon por la balotrajto al ĉiu *maturulo*.

La bela striko fervojista. — Ne ofte iu nomas ian strikon bela, sed fakte, mi citos unu. Ĵus finis sukcese fervoja striko, kiu kostis 2.000.000 Sm. La strikintoj estis 11.000 homoj en ĉiuj gradoj kaj rangoj. La striko originis

en la puno de lokomotivisto por ebrieco ekster deĵoro. La policaro arestis lin kaj bategis lin, poste la magistratoj monpunis lin pri malsobrecado, sed ili senkulpigis lin pri la kauzo esti atakinta la policanon. La estroj de la fervojo degradis la homon pro ĉi tiu, kaj li anstataŭ rapidlokomotivisto fariĝis lokomotivisto; la ĉiusemajna perdo je mono estis 4.50 Sm. La juĝito posedis bonegan karakteron kaj deklaris sin senkulpa. Liaj kunlaborantoj strikis kaj absolute haltigis komercon en Nord Anglujo kaj senlaborigis 30.000 homojn el aliaj industrioj. Ĉiu haveno estis plenigata per ŝipoj mankantajn karbon. La estroj de la metiouniigoj neoficialigis la strikon, kaj konsilis la revenon al laboro. Post unu semajno la registaro ordonis novan juĝon kaj miraklo el mirakloj, la delegato de la registaro trovis ke la lokomotivisto estis sobra, li opinias ke la policano estis mensoginta. Lia Muelo la reĝo Georgo Va gracie me pardonis lin kaj la fervoja kompanio bovenis lin al lia alta rango kaj ĉiuj relaboris. Jen bela striko, ĉu ne? Jes! Sed la metiouniigoj ne estas kontentaj, ĉar la pekemaj (ĉiam ili estas tiel) metiaj gvidantoj kontraktis (inter aliaj) ke la strikintoj ne insultos la rompistojn — ke ĉiu homo strikinta pagos monpunon de unu semajna salajro al la kompanio — ke estonte oni avertos la kompanion kiam ili intencas striki.

Amasegita kunveno en New Castle (strikcentro) forte malaprobis la agadon de la gvidantoj, kiu koston la laboristoj kune 20 000 Sm. kaj la salajroj perditaj estas egala sumo.

Pri la centoj da aliaj gravaj strikoj mi *ne skribos*. La parlamento faris leĝon kontraŭ la gekomercistoj en virinoj kaj la leĝo efektiviĝis tuj; iu ajn kiu iel asistas prostitucion de virinoj, estos tuj arestata kaj skurĝado estas la puno. Speciala policaro kreita por tio malhelpos tian abomenon (antaŭe mi raportis dufoje la progreson en parlamento de ĉi tiu leĝo, sed ĝi ne aperis en I. S. R.). HOYLE.

El Aŭstrio.

En la socia movado en Galicio. — La socialista movado inter la Ukrainanoj en Aŭstrio lasis post si pli ol 30 jaran historion, pri kiu mi intencas tie ĉi paroli. Por pli bone kompreni nuntempan movadon de kiu ajn lando kaj la cirkonstancojn, inter kiu tiu ĉi movado evolucas, oni devas ekkoniĝi kun ĝia historio kaj, se oni povas tiel diri, kun ĝia natura fundamento, sur kiu ĝi evolucas. Des pli ĝi estas necesa al tiuj, kiuj legos pri la ukraina socia movado unuan

fojon. La historio estas ĉiam instruanta kaj tia mi supozas, mia artikolo estos al la kamaradoj-legantoj de nia Revuo ne nur interesa, sed ankaŭ utila. Antaŭ ĉio mi devas rimarki, ke mi parolos tie ĉi pri la socia movado nur inter tiu parto de la granda 30 miliona ukraina nacio, kiu loĝas en la nombro de ĉirkaŭ 4.000.000 en Galicio kaj Bukovino, lasante flanken pligrandan (26.000.000) parton de la ukraina nacio, kiu loĝas en la sud-okcidenta parto de Ruslando, pri kiu mi eble parolos alian fojon en nia Revuo.

Galicio estis de 1349 parto de l' historia pola ŝtato, kiu falis je la fino de 18a jarcento. El sub la regado de la pola ŝtato venis la ukraina nacio en Galicio kaj Bukovino sub la regadon de Aŭstrio; ĝiaj pli altaj klasoj tiam jam tute poloniĝis. Post la aligo de Galicio al Aŭstrio la pola „ŝlahta" (nobelaro), t. e. la posedantoj de grandegaj bienoj, konservis en siaj manoj la estraron super la ukraina nacio. Kiel ĉiu ŝtato, tiel same ankaŭ la aŭstria havas leĝon je la privata propeco kaj staras sur la flanko de tiu, kiu ĝin posedas. Tiel la fundamentaj leĝoj en Aŭstrio (1867) transdonis al la pola „ŝlahta", la tiutempa reprezentanto de la pola nacio, politikan kaj leĝan hegemonion super la pola nacio, aŭ pli ĝuste, al ĝiaj posedantaj klasoj super la tuta ukraina nacio. Per tio la ukraina nacio fariĝis en Aŭstrio unu el la malpreferitaj nacioj de la Ila klaso. Kun la evolucio de kapitalismo la ekonomie samnivela amaso de ukraina nacio komencis dispartiĝi kaj apartiĝis de unu flanko ukrainan burĝaron, de alia flanko ukr. proletariaron; sed la ambaŭ klasoj, ĉe aŭtonomiaj nacioj tute kontraŭstarantaj, tie ĉi egale sentas sur si la fremdan premadon. Kaj tial la nacia ukr.-pola batalo ĝis nuna tago malbeligas la klasan konscion. Kaj tial fine la socia movado en Galicio entute, post 30 jaroj de ĝia ekzistado, prezentas sin tre mizere. Sed ankaŭ aliaj kaŭzoj komplikas tiun ĉi malĝojan simptomon.

Galicio estas koncernante ekonomian evolucion tre malforta. 76.82 % da loĝantoj estas okupataj en la agrikulturo, 9.01 % en industrio, 7.81 % en la komerco kaj 6.36 % apartenas al la publika servistaro kaj al la liberaj metioj. 40 jara regnado de la pola „ŝlahta" alkondukis la tutan landon al ekonomia ruino. Tuta ilia politiko celadis ĉi tion: malhelpi la industran evolucion de la lando, por ke per tio la popolaj amasoj ne povu emancipi el la politika kaj ekonomia sklaveco, el la intelekta mizero kaj analfabetismo. Kiel malalte staras la civilizacio en Galicio, oni povas kompreni el

sekvaj ciferoj: en Galicio estas 4.678.022 analfabetoj, nome inter Ukrainanoj 2.459.410, t. e. 79 %, kaj inter Polanoj 2.104.899, t. e. 52 %.

En Galicio estas 3.074.000 da Ukrainanoj, precipe kampuloj. Kiel montras la statistiko de 1900 j., 94.4 % da ukr. loĝantaro en Galicio estis okupata en agrikulturo, kaj nur 1.8 % en industrio, komerco kaj trafiko. La laborista klaso de ukr. loĝantaro en Galicio disfalas tiel: 235.173 laboristoj okupataj en agrikulturo, 36.745 en industrio, komerco kaj trafiko, kaj 35.088 en publika servado kaj en liberaj fakoj: kompreneble, tiuj ĉi ciferoj post 12 jaroj kun la evolucio de l' kapitalismo grave ŝanĝiĝis kaj nun ne estas jam konformaj kun la vero. (Rezultatoj de la plej nova kalkulado, ne estas ankoraŭ finitaj) Kun la ekonomia evolucio de la lando progresas ankaŭ la proceso de l' diferenciado, kiu precipe aperas per tio, ke la nombro de la proletariaro pligrandiĝas, kaj vilaĝanoj transiras en urbojn, serĉante tie laboron.

El Bohemujo.

Socialdemokrataj deputitoj por milito! — Oni ankoraŭ ne forgesis la entuziasman paroladon de pola soc. dem. deputito Daszynski antaŭ kvin monatoj en aŭstria parlamento, por la konstanta kaj kontraŭ milicisterna armeo. La koncernatan deputiton tiam por lia parolado registaraj kaj militarismaj parlamentanoj per aplaŭdoj kaj gratuloj rekompencis — kaj jam denove pola kaj germana socialdemokrataj deputitoj Lieberman kaj Renner pruvis siajn patriotismajn, sed ne homemajn nek socialistajn sentojn.

Jen esprimo de deputito Lieberman en la parlamento la 5an de Decembro:

„Polaj socialdemokratoj ne intencas pli potencigi serban imperialismon apogatan per rusa barbareco. Se Aŭstrio estas atakata de Rusujo, plenumos Poloj en Galicio sian devon kaj polaj socialdemokratoj fariĝos en ĉi tiu momento aŭstria defendantoj”.

Germana socialdemokrato Renner aliĝis en la nomo de german-aŭstria socialdemokratoj tute al esprimoj de deputito D-ro Lieberman, aldonante: „Se rusa carismo estos minacanta niajn rajton, liberecon kaj evoluadon, tiam ĉiuj socialdemokratoj kiel unu viro estos pretaj per sia tuta forto. Estus ridinde supozi, ke socialistoj povus idej, rifuzi defendon kaj provizadon al la armeo.”

Ĉu koncernataj deputitoj ne opinias la enmiksadon de Aŭstrio en balkanlandaj aferoj ankaŭ kiel defendo de aŭstriaĵoj interesoj? Se jes; kion devus fari la kamaradoj de Serbujo, kiun volas ataki aŭstriaĵoj militantoj? Laŭ german aŭstriaĵoj kaj polaj socialdemokratoj ankaŭ defendi patrujojn atakatan. Se Aŭstrio ne atakos Serbujon, tiam Rusujo ne atakos Aŭstrion — Aŭstrio estas ne minacata sed atakanta Ĉu tion ne pripensis la „representantoj de la popolo laboranta?”

Kio okazos dum simila, reciproka defendado scias nur tiuj, kiujn la afero rekte rilatas — kaj tio estas tuta popolo laboranta — tiuj, kiuj vidas forveturi la patrojn, edzojn, fratojn, gefratojn kaj filojn kaj rigardas ĉi tiujn tre funebre kaj disiĝadas de ili ĉiam plure. Okazis eĉ demonstracioj kaj arestado dum forveturo de soldatoj suden. En nia lando ne estas plu monstroj — escepte el milito profitemaj kaj tutgermanaj fanatikuloj — kiuj estas por la milito tiom entuziasmaj, kiel ekzemple Balkanlandanoj, Poloj aŭ loĝantoj de Alpaj landoj. Ĉi tie eĉ malgranda infano scias, ke vundoj kaj malsato doloras; se tion ne scias la koncernataj deputitoj kiel gvidantoj de laboristaj amasoj, estas tre bedaŭrinde!

La manifesto de socialista packongreso estas konfiskita. Nenie krom en Aŭstrio kaj Rusujo estis malebligata la pacmanifeston ekkoni. Socialdemokrata deputito Seitz volis koncernatan manifeston legi en formo de interpelacio; sed la ĉefministro grafo Stürgh, volonte tion malebligis, esprimis, ke li fermos la parlamenton, se oni permesas legi koncernatan manifeston. Minaco efikis. Dum la balotado ĉu permesi aŭ malpermesi la legadon de la manifesto kiel interpelacio ĉeestis el 83 en vortoj okdektri, nur 26 socialistaj deputitoj kaj la propono nur je kulpo de proponantoj falis.

La gazetaro de la partio soc. dem. pri tio skribas ke deputitoj kiuj ne ĉeestis dum balotado por propra socialista afero, ankoraŭ ne revenis de Bazelo, kaj tial ili ne povis partopreni la balotadon. Sed oni pri tio forte dubas, ĉu el Aŭstriaĵoj landoj partoprenis la kongreson 57 deputitoj. Se jes, kial do Seitz ne atendis kun sia propono ĝis ili estos revenintaj? Oni tion juĝas diverse. Estas eĉ homoj kiuj diras ke la deputitoj timis perdon de dietoj, se estus la parlamento fermita; ke tial ili pli volonte per forresto el parlamento ebligis malakcepton de propra propono. Ni ĝis hodiaŭ ne scias pri kio oni agis en la packongreso.

VERAMA, soc. dem.

El Franclando.

Manifestoj kontraŭ milito. — La socialista partio faris grandan mitingon en Parizo, kiun ĉeestis fremdaj delegitoj. La amaso estis grandega; de 4 tribunoj parolis socialistoj kaj anarkiistoj. La Esperantistaj kamaradoj el „Liberiga Stelo”, „Federation Syndicale Esperantiste” kaj „Eslio” ĝin ĉeestis kaj alparoladis esperantlingve la amason.

La „Konfederacio de l' Laboro” organizis kongreson specialan. En la daŭro de kelkaj tagoj ĉio estis farita tiel bone ke pli ol 1500 delegitoj adoptis entuziasme fari ĝeneralan strikon dum 24 horoj por sciigi, ke la popolo ne plu volas militon.

Tiu striko estis antaŭita de mitingoj tra tuta Franclando. Ili okazis dimanĉon la 15an, la striko la 16an de Dec.

Strikis en Parizo 120.000 kamaradoj, en kelkaj grandaj urboj, kiel Lyon, la tuta laborista loĝantaro strikis. Ĉe la landlimo, en la departemento de Ardennes, kie laŭ la diroj estas neniam da kontraŭmilitemuloj, strikis 50.000 kamaradoj. En la tuta lando estis da ili 600.000.

Ĉu estas necese diri, kiel demokrata respubliko permesas ke la popolo sciigu sian opinion pri tia grava afero?

Jes! ĉiu sciis bone kiel la leĝoj estas valoraj. La rajto striki estas leĝigita de l' jaro 1884; tamen antaŭ la striktago ĉe ĉiuj administracioj ŝtataj, kie oni devus plej zorge respekti la leĝon, la laboristaro estis sciigata, ke ĉiu kiu ne laboros tiun tagon estos severe punata, eĉ eksigata. La urbkonsilantaroj, prefektoj, agis same. Sed ĉu tial ke tiuj laboristoj ne povis protesti ne timante perdi la laboron, ili estas patriotoj? Eble ne!

La protesto estis bela, vigla. La subpremo estis malbela, malkuraĝa.

Policistoj, soldatoj, spionistoj estis pretaj mortigi.

Traserĉoj, persekutoj, malliberigoj estis multaj kiel ĉiufoje kiam oni volas uzi leĝon kiu povus iom profiti al ni.

La alproklamo de l' milito estos tiu de la ĝenerala striko.

La registaro alproklamos sian morton samtempe kun la ribelo.

A. PANLOU.

Eslio protestas kontraŭ la artikolo „Lastaj rimedoj kaj principoj” (vidu n-ron de Dec. 1912):

La leĝo Millerand-Berry, kiun la socialistoj francaj nomis „la loi infâme” (la malhonora leĝo), estis ja voĉdonata sur-

prize, kiel verece skribas Girard (inter du gravaj partoj de la diskutado pri la proporcia reprezentado). Sed tuj, kiam la socialistaj deputitoj — kiuj ja konfesas esti malpravaj, ĉar ili ne atentis pri tio, kaj nun zorgas, ke tio ne povas ankoraŭ okazi — tuj kiam ili sciigis pri la afero, komencis agi por korekti tute aŭ almenaŭ parte la malindajn detalojn de tiu leĝo. Mi mem sekvis atente tiun agadon kaj certigas, ke la direktado de Girard estas malinda mensogo aŭ gravega eraro.

La socialistoj ricevis nur sukceson partan, sed gravegan: nun oni povos uzi la leĝon kontraŭ junulo kondamnita pri politika, strika k.t.p. afero nur se li estas kondamnita dufoje.

Same kiel skribas Compère-Morel en la jena letero, kiun li ĵus sendis al mi, mi pensas ke la deputitoj faris, krom pri la surpriza komenco, sian tutan devon.

TAKNOEL.

Parizo, 23 Dec. 1912. Kara samcivitano. Dank' al sia agado en la Komisiistaro de la Armeo, la delegitoj de la Parlamenta Grupo Socialista povis ricevi tiun rezultaton, ke nun necese estas, ke oni estu dufoje kondamnita, por ke la leĝo Millerand-Berry frapu la agantojn laboristajn kaj socialistajn.

Poste mi mem postulis la nuligon de tiu leĝo, je la komenco de Novembro. Ni estas venkitaj, sed faris nian devon, kaj oni devas esti de malbona intenco por kuraĝi riproĉi al ni, ke ni ne faris nian devon.

Pri mia nomo kunmetita kun tiuj de Millerand kaj Berry, estas plej stranga afero, ĉar estas mi, kiu petis la parlamentan socialistan grupon enmiksiĝi en tiun aferon, kaj mi ankaŭ, kiu en la Ĉambro parolis kontraŭ la projekto mal-liberiga. Via

COMPÈRE-MOREL.

El Hungarujo.

En la Hungara parlamento dum la lasta tempo estis en la tagordo la interpartia kverelado. Por tio la plimulto eljetigis per policanoj la malplimulton. Tiam la malplimulto (opozicio) faris grandan bruon, kial ilin „neleĝe” oni eljetis el la parlamento. Bone respondis la plimulto, se vi tial plendas, ke ni neleĝe eljetis vin, ni tuj helpas pri tio! Kaj ili faris leĝon por organizi apartan parlamentan gardistaron, per kiu la prezidanto povas „laŭleĝe” eljetigi la obstinajn deputitojn. Nun la malplimulto ne havas kaŭzon por plendi. Malgraŭ ĉio ĉi, tamen ekzistas malbonhepatuloj, kiuj trovas senutilaj la parlamenton kaj la leĝaron.

Nun, ĉar la milito inter Aŭstrio-Hungarujo kaj Serbujo estas en la sojlo, estas tre multe da laboro en la municia fabrikejo; oni bezonas multe da laboristoj, ĉar la laboro daŭras nokte kaj tage. La fabrikejo, por ricevi laboristojn, petis la dungejon de metallaboristoj, por ke ĝi sendu tornistojn en la nomitan fabrikejon. La dungejo, por plenumi la peton, alvokis ia senlaborajn tornistojn, ĉeestantajn en la dungejo, ke ili iru labori en la munician fabrikejon! Sed tiuj protestante rifuzis tiun laboron, dirante, ke ili ne faros kuglojn kontraŭ si mem kaj kontraŭ siaj fratoj! Kaj kio estis la rezulto? Tio, ke la gvidantoj minacis per forpelo el la organizajo tiujn, kiuj ne iras tien labori. Kaj tiuj ĉi kamaradoj iris en Baselon, por hipokrite bruegi kontraŭ la milito.

La mobilizado ĉiam pli kaj pli intensiva estas: la rezervistoj bone obeas la envokon. Ĉi tie oni neevitebla pensas la militon inter Aŭstrio-Hungarujo kaj Serbujo.

La parlamento akceptis leĝon, laŭ kiu — dum milito — la registaro povos malfunkciigi la tutan konstitucion, kaj ĝi severe punos la strikantojn kontraŭ ja milito; plue ĉiu viro ĝis kvindekjara aĝo, devos esti militisto — se estos necese.

Budapest 15/XII 1912.

SINCERA.

Mia devo estas klarigi la tutmondajn gefratojn pri nia sorto, en Hungarujo.

Ni proletaroj en nia lando havas sorton kiel bestoj. Momente, miloj kaj miloj da proletarioj estas enestigataj en vestoj de soldatoj, devis forlasi edzinojn, infanojn etc. Kial? Por ke ili iru rabi kaj mortigi en Serbujo.

Ni, kiuj havas feliĉon ne esti soldato, ni ankaŭ suferas korpe kaj anime. La socialistoj estas persekutataj en la tuta lando, ne libere povas paroli publike, nia partia organo estas atentata de ministraro de internaj aferoj, ke ĝi ne skribu kontraŭ milito, ĉar tiam la redaktoroj ricevos punon da 1 ĝis 5 jaroj.

Neniam estis pli granda reakcio en Hungarujo ol nuntempe. La loĝantoj de nia lando vivos en la plej granda mizero, sen laboro estas la plej granda parto el laboristoj. Nia reĝo bone elektis siajn ministrojn; liaj kolegoj en aliaj landoj povas al li gratuli. La plej grandaj friponoj estas sur la tero la ĉefministro Lukacs kaj lia kolego, prezidanto de hungara parlamento, Tisza.

Ĉefministro de Hispanujo, antaŭ kelkaj semajnoj mortigata

de anarkiisto, estis anĝelo kompare al suprenomitaj friponoj. Mi kredas, ke en Hungarujo ankaŭ estos homo, kiu ne toleros, ke ili regu longe super ni!

Mi tre ĝojas pri tio, ke nia partiorĝano „Népszava” (Popolvoĉo) ankaŭ komencis batali novmetode, ĉar aperas artikolo post artikolo, kiu plej akre vokas la atenton de laboristaro, ke ili ne lasu forrabi siajn ekzistantajn rajtojn, sed ke ili batalu kontraŭ registaro kun la rimedoj, kiujn oni povas uzi kaj trovi.

For la milito! Maisupren l' armilojn!

F. KADI.

La kaŭzoj de prostitucio.

Antaŭ nelonge en Anglujo, post brua agitacio de l' pastraro, estis akceptata leĝo kontraŭ la komerco je virinoj: tiaj komercantoj estos de nun punataj per korpaj turmentoj.

La fama angla verkisto Bernard Shaw diris pri tio en „The Awakener” (La Vekanto) i. a.:

„Ne trompu vin — la plej multaj el tiuj, kiuj ekzistas per la gajno el prostitucio, ne estos batalataj. Ili estas trov-eblaj pleje inter tiuj indignaj poruloj de korpaj turmentado. Inter tiuj, kiuj vivas per la prostitucio ja estas: grandaj sinjoroj, episkopoj, juĝantoj, parlamentanoj, nobeluloj, unu-vorte: grandega nombro el la apogantoj de l' burĝa puritanismo. Ĉar tiuj personoj posedas akciojn en industriaj entreprenoj, en kiuj laboras armeoj da virinoj, fraŭlinoj, knabinoj. Miloj el tiuj virinoj ricevas salajrojn nesufiĉajn por sin nutri. Kaj ili estas traktataj kun malpli da estimo ol tiu aŭ alia prostituciulino. Se tiuj virinoj plendas pri la malalta salajro, tiam oni respondas, ke ja estas multaj rimedoj por kompletigi ĝin. Sed, por ĉiuj virinoj, kiuj ne havas patron aŭ edzon, kiu kompletigas ilian nesufiĉan salajron, restas nur unu rimedo: la strato. Kaj estas multaj — orfinoj, vidvinoj, fraŭlinoj el la provincoj aŭ el eksterlando — kiuj ne havas familion nek patron aŭ edzon por ilin subteni. Tiel la laborforto de grandnombro da virinoj estas konservata per tio, kion ili gajnas sur la strato. Kaj tiu laborforto estas uzata por krei dividendojn por riĉaj akciuloj, kiuj per laŭta kreado pri punoj por ordinaraj „subtenatoj”, deziras dekonduki la publikan atenton de sia kunkulpeco. Sed, se tiuj subtenatoj volas lui domon kaj pagas altan luprezon, ĉu oni tiam

rifuzas lui al ili? Kial do oni ne postulas korpe puni la domposedanton, kiu forluas sian domon por tia celo?

Kaj kion oni prezentas al la fraŭlinoj, por ke ili forlasu la straton? Pian domon, ĉu ne? sub kies tegmento ili trovas ne nur la saman senkompatan havemon de l' fabrikejo, sed super tio la nigran enuon de malliberejo kaj moralan damnadon, kiu nebligas ĉiun memestimon.

Ekzistas nur unu kuracilo kontraŭ la komerco je virinoj: certigu al ilin sufiĉan salajron, ŝirmu ilin kontraŭ senlaboreco! Tiam tia komercanto ne havos pli da potenco je la filinoj kaj edzinoj de laboristoj, kontoristoj, malgrandaj entreprenantoj, ol li havas je la filinoj kaj edzinoj de episkopoj k t.p.

Antaŭ nelonge en Nederlando estas de la klerikala registaro eldonata leĝo simila. Kaj la vortoj de Shaw mirinde tralas ankaŭ nian hipokritan burĝaron kaj nian klerikalan jurnalistaron, kiuj kune eksplodis en histeria aplaŭdo pri tiu leĝo kontraŭ prostitucio.

W. N.

Alvoko al la internacia laborista konsularo.

Laŭ decido de l' unua germana esperantista laborista kongreso, nia dua kongreso okazos je pasko 1913 en ĉi tiu urbo. Laborista kongreso ne estas amuzajo, sed tagoj laborplenaj kaj, kiel ni ĉiuj esperas, sukcesplenaj por la disvastigado de nia lingvo inter la por ĝi indiferenta nacia laboristaro revoluciema.

Tial okazos publika kunveno kun eksterlandaj parolantoj. Ĉar la parolata vorto efikas pli bone ol la skribata. Pro tio mi nun petas la kolegojn konsulojn pritrakti en siaj grupoj (aŭ asocioj) ĉu ne estus eble sendi delegiton, por ke la indiferentularo povas vidi la influon de Esperanto inter la internacia socialistaro revoluciema.

Montru ni al niaj samcelaj, sed ne-esperantistaj fratoj, ke nia esperantista solidareco estas tiel granda kiel nia politika. Mi estas preta respondi demandojn poŝtkarte aŭ letere laŭdezure.

KARL KABIG, I. L. K.

Frankfurt a. Main, Wasserweg 16.

La Esfio.

Kunveno de la 15a de Decembro. — La protokolo de la lasta kunveno estas aprobata.

En kolekto de la Esfio aperos baldaŭ esperanta traduko de broŝuro de Cachin, urbkonsilano de Parizo, farita de 2 kamaradoj el la esfia grupo en Limoges. La grupo pariza mendas 50 ekzemplerojn.

Ne estos komunikata la listo de membroj de Esfio. Aperos en „Tutmonda Jarlibro” la nomoj kaj adresoj de la grupoj socialistaj kaj de la gazetoj laboristaj.

La grupo decidis respondi al artikolo tradukita el „Les Temps Nouveaux”, kiu aperis en I. S. R. kaj kiu enhavas erarojn kaj atakojn kontraŭ la Partio Socialista.

La kartoj de Esfio estos presata en Parizo.

Oni raportas pri la 9 paroladoj faritaj depost la lasta kunveno, en la grupoj socialistaj de l' Federacio de la Seine. Estas elektata delegito, kiu faros la proponon pri la lingvo internacia Esperanto dum la Kongreso de la Federacio.

La grupo decidis ekzameni zorge la demandojn pri kursoj.

Monkolekto estas malfermita por aĉeti akcion de I. S. R.

Kamarado kiu ĉeestis la kongreson en Basel, raportas pri tiu kongreso. La grupo aprobas poste la proteston socialistan kontraŭ la milito.

La proksima kunveno okazos la dimanĉon 19an de Januaro, je la 9a matene, Maison Commune du 3e, 49, rue de Bretagne.

Bibliografio.

„Moderna Barbareco” de C. A. Laisant. Tiu estas la titolo de nova libro aperinta en franca lingvo. La aŭtoro estas sufiĉe konata por scii kion li kapablas verki.

Tiu verko estas serioza kritiko de la nuna socio, kiun ĉiuj kamaradoj volos posedi kaj disvastigi.

Por tio esperanta eldono estas en preparado.

Tiu libro de pli ol 300 paĝoj estos vendata al ĉiuj subskribintoj nur 1 Sm. a frankite.

Enhavo: Antaŭparolo. Aĝo de l' Terglobo. Aĝo de l' Homo. *1a Parto, Homa Spiritstato*: Ĉap. 1—7: Iamaj cerboj kaj nuntempaj cerboj — Perforteco, Krueleco — Mal-estimo de malfortuloj — Timo, Sangsoifeco — Superstiĉo — Vanteco, Ordonpovo — Avideco. *2a Parto, La Institucioj*: ĉap. 1—11: La Registaroj — La Leĝoj — La Patrolandoj —

La Militoj kaj Armeoj — Justeco, Polico — La Familio — La Edukado — La Religioj — La Financo — Moderna sklav-eco — Universa Mensogo. — *3a Parto*: ĉap. 1—6: La Scienco — La Naturaj Leĝoj — La Moderna Industrio — La Sociologiaj Leĝoj — Internaciismo — La Irado al Estonteco — Postparolo. Indekso de l' cititaj nomoj.

Ĉiu senprokraste sendu 1 Sm. al k-do Louis, 49, rue de Bretagne. Paris, por ke oni povu difini la nombron da ekzempleroj presotaj.

Red. de I. S. R. preparis tradukon de l' Manifesto de l' „Internationale” (manifesto de l' kontraŭmilita kongreso en Basel, 24/25 Nov. 1912). Ĝi estas tro granda por Revuo. Tial adm. intencas presigi ĝin sur flugfolio. Se sufiĉa kvanto estos mendata, ĝi povas tuj aperi. Prezo 1 ekz. 4 Sd., 10 ekz. 30 Sd., 25 ekz. 60 Sd., 50 ekz. 1 Sm. Tre taŭga por lab. esp. societoj por disdoni kaj sendi al lab. gazetoj. Mendu tuj.

Korespondado.

Oni jam ofte rimarkis, se oni skribis al k-do, kiuj laŭ anonco en I. S. R. deziras korespondadi, ke ili tute ne respondas. Mia opinio estas, ke ĉiu k-do, kiu anoncis sin en nia organo, havas la devon respondi almenaŭ per unu karto. Estas, certe, ne bonkamarada, se oni kolektas kartojn de aliaj, tute ne respondante la sendintojn. M.

K-do Manuel Duaygas, Calle de Monserrat Matadepera, Tarrasa, prov. Barcelona, Hispanujo, dez. kor. kun gesam-ideanoj en ĉiuj landoj.

K-do Teodoro Argintescu, Str. Rotari-Obor 38, Bucarest, Rumenia, dez. kor.

K-do Faulhaber, Borgerstraat 1031, Amsterdam, Neder-land, dez. kor. kun k-do en aliaj landoj.

K-do H. Schapitz, Zeughausstr. 7, Wolfenbüttel, Germanujo, kaj k-do K. Richer, Kaiserplatz 11, Wolfenbüttel, Germanujo, dez. kor. pri la moderna laborista movado kun gesam-ideanoj tutmonde; ĉiam resp. (poŝtk.).

K-do F. Kády, Ker. munkás biztosito, Nádor uteza, Komárom, Hungarlando, dez. kor. p. pk. kun soc. kaj anarĉ. precipe kun kamaradinoj.

En Nov.-numero mi enpresigis mian adreson (Germanujo, Zwetschenberg 121, Ilmenau Thür.) por korespondado kun gesamideanoj. Baldaŭ poste mi devis forlasi Germanujon kaj transloĝi Belgujon. Kiel mi nun eksciis, estas ricevataj por mi (en Germanujo) skribaĵoj de kelkaj samideanoj. Estas ja kompreneble, ke mi ne povas respondi al ili nun, ĉar mi ne ricevis la skribaĵojn. Pro tio mi petas koran pardonon ĉe kamaradoj, al mi skribintaj. Kun frataj salutoj al ĉiuj verd-revoluciemuloj.

G. SEIDLER, Liège (Belgique), rue Henri Maus 85.

Deziras kor. per pk. aŭ letero: Fraŭlino Elsa Höhle, Dresden 6, Martin Lutherstr. 35. — Makso Höhle, Dresden 6, Martin Lutherstr. 35. — K. Schramm, ligna laboristo, 18-jara, Dresden-Neustadt, Lüchenstrato 27/1 — Schmiedgen, Dresden-Neustadt, Friedenstrato 11. — Georg Roth, Dresden-Neustadt, Markgrafenstrato 14. — A. Geissler, Dresden-Neustadt, Seb-nitzerstrato 49/III. — W. Petzold, Dresden-Neustadt, Försterei-strato 36/I. — F. A. Arnold, Dresden-Neustadt, Frieden-strato 4/I. — Walter Ludwig, Dresden 12, Görlitzerstr. 28 Mh. II r.

En Bukureŝt, Rumenujo: Jean Nastea (nuna adreso: ĉe Rumana Esp. Societo, Str. Belvedere 14); nur kun rusaj, portugaliaj, danaj k-doj. — Dimitrie Işoveanu, Str. Laboratoro 16; precipe kun rusaj gek-doj. — Ştefano Maraĉineanu, Str. Eminescu 18; kun ĉiuj landoj. — Jon Ştefanescu, Bulev. Ferdinand 84; kun ĉiuj landoj.

Se iu k-do deziras sciigon aŭ korespondanton el Berlino, nur skribu al la grupa centro, Blankenfeldestr. 10, Berlin O.

K-do H. R. Voigt, Wiedritzscherstr. 16/II, Leipzig-Gohlis, petas forvojaĝintajn lernintojn de si, sciigi la nunan adreson.

K-do A. Seifert, Leipzig, Berlinerstrato 5 IV intencas kun amiko forvojaĝi alilanden kaj petas kamaradojn en grandaj urboj en ia ajn lando sendi al li sciigojn pri vivkondiĉoj, laborŝancoj kaj gajno por masonistoj en siaj urboj.

Novajoj de ĉie, statistiko pri nia Revuo, parto de Biblio-grafio, Niaj Kalkuloj, kvankam ĉiuj pretaj — devas atendi ĝis la proksima no., ĉar kelkaj kamaradoj sendis grandan artikolon, kiam Revuo tute jam estis kompostita. Por Socia Movado oni sendu nepre antaŭ la 20a de l' monato.